# *Díaz-Canel gratulas la elektan venkon de MAS kaj Luis Arce de Bolivio*



Havano, okt 19 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel esprimis per la socia retejo Tvitero sian ?ojon kaj gratulon al la Movado Al Socialismo (MAS), kiu rekuperas la prezidantecon de la sudamerika lando.

“Gratulojn al MAS, kiu rekuperis en la urnoj la povon uzurpitan de la oligarkio kunkulpe de la organizo de amerikaj ?tatoj kaj la imperia gvido”.
La kuba ?tatestro emfazis ke “Kubo dividas la ?ojon pro la venko de Luis Arce” kaj festas la renaski?on de la bolivara idearo.

Same, la ministro de eksteraj rilatoj de la insulo, Bruno Rodríguez, sendis gratulojn al Luis Arce, al David Choquehuanco kaj al MAS “pro la historia kaj trascenda venko, kiu redonos justicon kaj bonfarton al la frata bolivia popolo”

?i-dimance la 18-an de oktobro okazis en Bolivio la prezidentaj elektoj kun grandaj esperoj, post preska? unu jaro de pu?o, kiu forpelis la elektian prezidenton Evo Morales.

Sciinte la rezultojn je urna bu?o, kiu konfirmis la elekton per 52,4% de la vo?oj, Arce esprimis ke lia lando rekuperis la demokration kaj la esperon.

Li dankis la popolon kaj la membrojn de MAS kaj al la internacia komunumo pro akompano en la elekta procezo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/237221-diaz-canel-gratulas-la-elektan-venkon-de-mas-kaj-luis-arce-de-bolivio

**Radio Habana Cuba**